

Irina Bokova enviciĝis inter la diktatoraj potenculoj de la mondo en Moskvo

Irina Bokovo, ĝenerala direktorino de UNESKO, estis videbla sur fotoj faritaj antaŭ la Monumento de la nekonata soldato en Moskvo, Ruslando (ĉu ŝi partoprenis ankaŭ en la armea parado mi ne scias). En Moskvo ŝi aperis la 9an de majo 2015 lige kun la paradoj kaj ceremonioj okazigitaj okaze de la 70a datreveno de la militfino en 1945. Dum la Okcidento bojkotis la eventon en Moskvo pro la milita politiko de Ruslando rilate al Ukrainio, la paradon ĉeestis ŝtatestroj de landoj, kiuj estas konsiderataj pro siaj diktaturaj reĝimoj - kiel Ĉinio, Kazahio, Kubo, Zimbabvo k.a. La solaj eŭropanoj, kiuj partoprenis la paradon en Moskvo, venis el Serbio, Ĉeĥio (Zeman) kaj Slovakio (Fico).

Inter la partoprenantoj de la ceremonio oni vidis krom Ban Ki Mun, ĝenerala sekretario de UN, ankaŭ Irina Bokova, ĝeneralan direktorinon de UNESKO, pri kiu estas konate, ke ŝi strebas fariĝi posteulo de Ban. En tiu senco ŝajnas, ke ŝi misuzis sian vojaĝon al Moskvo por personaj karieraj celoj, ĉar por la elekto al la posteno kiel ĝenerala sekretario de UN ŝi dependas de la subteno de Ruslando. La ĉeesto de Bokova en tiu momento en Moskvo tamen estas malfacile komprenebla, despli ke Unesko pledas por la libereco de la opinio kaj gazetaro kiel parto de la homaj rajtoj, kiu apenaŭ ekzistas en Ruslando kaj en la plimulto de la ŝtataro, el kiu venis la eksterlandaj partoprenantoj.

La pugolekantoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo regule reproduktas la hipokritajn mesaĝojn de Irina Bokovo, kiujn ŝi dissendas okaze de specialaj tagoj dediĉitaj al homrajtaj k.s. temoj. Irina Bokovo estas la filino de iama ĉefredaktoro de la gazeto "Rabotniĉesko Delo", kiu funkciis kiel centra organo de BKP, kiu estis regata de Todor Ĵivkov, kiu totalisme subpremendis la bulgaran popolon dum 35 jaroj. En la 1970aj jaroj Bokovo ne nur studis en Moskvo sed ankaŭ kunlaboris kun la bulgara ministerio pri eksterlandaj aferoj, kie ŝi havis diversajn funkciojn. En 1982-84 ŝi reprezentis Bulgarion ĉe UN. Ŝi membras en la Bulgara Socialisma Partio, posteulo de BKP. Okcidentaj membroŝtatoj de Unesko riproĉas al Bokova, ke ŝi malfaciligis la situacion de Unesko el ekonomia (financa) vidpunkto kaj ke ŝi kondukis la organizaĵon en la politikan izolitecon. Krom tio, Bokova estis kritikita pro aliaj skandaloj. Ŝajnas ke Bokova estas la modela tipo de politika oportunisto, kiu kapablas adaptiĝi al ĉiuspeca politika sistemo. Ŝia elekto kiel ĝenerala sekretario de UN estus falsa signalo kaj granda eraro kaj probable akre profundigus la malkredindecon de tiu monda organizaĵo, kvankam ankaŭ Ban Ki Mun el Koreio jam estis malsignifa personeco. Unu el la antaŭaj ĝeneralaj sekretarioj de Unesko, Amadou-Mahdar M'Bow, restis en la memoro de la esperantistoj, ĉar liaj mesaĝoj esprimis certan simpatian por Esperanto. Tamen, ankaŭ M'Bow estis unuavice la reprezentanto de la triamonda kanajla ŝtataro, pro kio li estis internacie kontestata kaj lia organizaĵo bojkotita de Usono. La sama problemo certe minacos ĝin, se Bokova fariĝos nova ĝenerala sekretario.

<http://www.kp.ru/online/news/2051174/>

<https://twitter.com/dimsmirnov175/status/596984901699817472/photo/1> de shtat

<https://twitter.com/dimsmirnov175/status/596975114689839104/photo/1>

http://en.wikipedia.org/wiki/Irina_Bokova

www.planlingvoj.ch, 9a majo 2015